

Aprilo 1908

UNU FOJON...



ESPERANTA PRESSEJO
Sinto Abato, 45. BARCELONO

Unu ekzemplero : 0'100 sm. 0'30 fr.
10' » 1 » 2'50 »
50' » 4 » 10' »

Mendojn de MIKAELO CASES
Salmerón, 229, 4.ª 2.ª - Barcelono

2033

Resistente:
Miguel Cases - Salmerón, 229. Barcelona



UNU

FOJON...



Federación Española de Esperanto
Hispana Esperanto - Federacio

Rodríguez San Pedro 13 - 2^a - 7, E-28015 MADRID
Tel. +34 - (91) - 4433079

TOBELLA & COSTA, presistoj
- Strato Asalto, 45; BARCELONO -

2033

Box 1970 hef 002033 mf



DEDIĈO

al Sinjoro FREDRIKO PUJULÁ

*Tiel distinginda, kiel karega Profesoro:
Bonvolu akcepti tiun ĉi modestan laboron,
la unua, kiu eliris el via, ĉu humila ler-
nanto, ĉu ne klera esperantisto, tamen
unu el la plej entuziasmenaj pri nia
Zamenhofa lingvo.*

Ĉiame via vera seropretulo,

MIKAELO CASES

Esperantisto 17167,
Prezidanto de Espero Kataluna kaj Kasisto de l' Kvina



— Amiko, kiajn insultojn diris sin reciproke hieraŭ posttagmeze Sinjorino A. kaj Sinjorino B!

— Ĉu ili nomis sin malbelaj?

— Ne.

— Tiel, lasu al mi la taskon repacigi ilin.

—

Postulata granda sumo al unu reĝo, por nur du ovoj kiujn li fluidsucis en la kamparo, demandis li la postulanton:

— Nu! Ĉu en tiu ĉi lando malsufiĉegas la ovoj?

— Ne, Reĝa Moŝto, sed jes la Reĝoj, respondis la kamparano.

—

Kamparano eniras en optikistan butikon dirante:

— Ĉu vi havas okulvitrojn por povi bone legi?

— Jes, jes; por bone legi, bone skribi kaj bone vidi ĉion.

— Montru al mi kelkajn.

— Jen, provu vi tiujn; tiujn ĉi; tiujn aliajn.

— Per neniuj mi povas legi.

— Sed, ĉu, per tiuj ĉi lastaj, vi vidas bone la literojn?

— Tute jes.

— Do mi ne trafas la kialon. Ĉu vi scias legi?

— Neniam mi tion sciis; tial mi deziris aĉeti la okulvitrojn.

— Ĉe socialismema Sinjorino A. kaj, apud ŝi, sidis Sinjoro B., altrangulo, kiu ne sciante, kion respondi al ŝi pri la homa egaleco, eliris serĉi lakeon, kiun sidigis sur la apudan seĝon de Sinjorino A.

— Kion vi faras?, diris tiu ĉi.

— Mi praktikas la egalecon, pri kiu vi parolas.

— Efektive, kaj vi eltrovis vian plej bonan anstataŭanton.

— Diru, Sinjoro Petro, kion vi kunportas tiel kaŝitan per tiu ĉi poŝtuko?

— Se mi dezirus ke oni tion sciis, mi ĝin ne kaŝus.

Sinjoro, kiu gardis tre bone kaŝitan kaj per sigelvakso kovritan kruĉon da multjara vino, rimarkis, surprize, ke mankis en ĝi, preskaŭ la duono de la vino. Serĉante la kialon, li vidis, en la fundo de la kruĉo, malgrandetan truon, vakse kovrita. Li alvokis la servistinon kaj demandis ŝin:

— Kial vi trinkis la vinon, kiu mankas ĉi tie?

— Mi ne trinkis; tra kie vi volas ke mi estus eliginta ĝin?

— Tra tie ĉi, respondis la Sinjoro, montrante la truon al ŝi.

— Ho ve! Tute ne; kaj eĉ se mi estus la aŭtorino de la truo, ĉu vi ne vidas ke ĝi estas mal-supre, kaj ke kie la vino mankas, estas supre?

Mastrino kaj servistino

— Kial vi volas nin forlasi? Ĉu vi ne estas ĝoja en nia domo?

— Tute jes, sed ĝi estas tre malproksime de la soldatejo.

La virinoj ludas kun la viroj kiel la akrobatoj kun siaj filoj: adoras nin, sed nin kripligas.

— Kion vi faras Konjo?

— Mi, nenion, Sinjorino.

— Kaj vi, Antono?

— Mi helpas Konjon.

— Kia mirakla Sanktulo estas Sankta Antono. Mi petis, fervore al li, ke mia edzo malŝatu la vinon, kaj la Sanktulo havigis al mi tion.

— Tial, via edzo jam ne plu ebriiĝas per vino..

— Tute ne; nun, nur per brando.

Amiko rakontas al alia, siajn vojaĝajn impresojn:

— Se vi povus vidi tiujn herbejojn el Meksiko! kiaj arboj!, kiaj sovaĝaj bestoj!, kiaj rampaĵoj!..

Serpentego, kiu estis almenaŭ kvin metrojn longa, mordis mian bopatrino.

— Ĉu eble mortigis la malfeliĉa sinjorino?

— Kontraŭe! La serpento krevis kiel cikado!

— Kia agrabla surprizo!, mi kredis ke vi mortigis!

— Ho ve! Ne sinjoro, ne; kiu mortigis estis mia fratino, sed mi estis pli malsana ol ŝi.

— Kiel vi pruvus al vi ke la mondo turniĝas?

— Tre facile; ebrügante min.

Ĉe komikprofesio, la trankvileco estas unu el la plej bezonataj kvalitoj kaj unu el la plej valoraj rimedoj por sukcesi.

En teatro, oni ludis teruran dramon, kiu finiĝis per mortigo de la protagonistino, per revolvero.

Sed jen, kiam alvenis la akxa momento, la revolvero ne pafis kaj la protagonistino, lasante sin fali teren, ekkriis tute aplombe:

— «Ho ve, mi malfeliĉa, mortas pro senfuma pulvo!»

— Ĉu vi vidas, sinjoro, kiel ĉarma, sprita kaj malkvietema estas mia fileto?

— Ho, jes, jes, mirindega!... sed diru al mi; je kioma horo oni kuŝiĝas lin?

Viro edziĝinta kun tre malbonkarakterata virino, iam, ne povis plu regi sin, kaj ŝin vangofrapis.

Alkuris, tiu ĉi lasta, al sia patro, kiu jam lacigita de ŝiaj senĉesaj estintaj kaj nunaj plendoj ŝin ankaŭ vangofrapis, aldonante:

— Diru al via edzo ke li insultis min, vangofrapante mian filinon; mi referas al li la insulton, vangofrapante lian edzinon. Ni estas kvitaj.

Kristino el Svedujo, ofte kaj atente rigardadis la statuon de la «Vero».

Iam, kortegano, diris al ŝi: «Via reĝa Moŝto, estas la sola el la suverenoj al kiu plaĉas la «Vero».

— Ho! ĉiuj veroj ne estas marmoraj!, ŝi respondis.

— Panjo! panjo!

— Kion vi volas, karulineto?

— Vi scias ke mi plantis terpomojn; sed, ĉu vi scias kio eliris?

— Eble, terpomoj.

— Ne; ne tio: eliris porko, kiu manĝis ilin...

Patrino rimarkis, ke dum ŝia forestado, oni prenis sukererojn el la sukerujo.

Ŝi alvokas siajn filinojn Manjon kaj Jozefinon kaj demandas ilin:

— Kiu el vi manĝis la sukererojn, kiuj mankas?

— Mi ne; ekkrias, ambaŭe, Manjo kaj Jozefino.

— Nul, unu el vi mensogas!

— Estis Manjo... diras Jozefino.

— Ne; ne estas vere, ĉar kiam mi prenis ilin, Jozefino ne estis tiel!, respondis Manjo.

— Kie vi deziras ĝui vian libertempon, mia filino?

— En loko, kie ne elkreskos fazeolojn, panjo... Mi ilin manĝis tiel ofte en la lernejo...!

SinJORino iris viziti amikino. Ŝi ne trovis ŝin hejme sed rimarkis ĉiujn meblojn kovritajn per polvo. Dezirante doni lecionon al ŝia amikino ŝi skribis per fingro sur la tablojn la vorton: «por-kino».

Dum la sekvanta tago, ŝi renkontas sian amikino, strate, kaj al ŝi diras:

— Hieraŭ mi iris al via domo kaj vi tie ne estis.

— Jes, mi ja scias ke vi ĉeestis, ĉar mi vidis vian surskribon sur ĉiuj mebloj.

Ternis mallongnazulo kaj petolulino, kiu staris antaŭ li, ekkriis:

— Dio konservu al vi la vidadon.

— Kial li devas konservi al mi la vidadon?

— Tial ke via nazo ne taŭgas por kunporti okulvitrojn.

Malsprita viro, deziris vojaĝi, sed kaŝante al sia familio, kien li iros, kaj alvenante en la fervojan stacidomon, li petis de la oficisto bileton por 3^a klaso.

La oficisto demandis lin, por kie devas esti la bileto, kaj li respondis:

— Nu, scivolemulo! Mi kaŝis al mia familio, kaj ĉu vi volas ke mi diru tion al vi? Ho, neniel...!

Filino de riĉa amerikano enamiĝis je negro, kiu korespondis kun ŝi per leteroj. Sur unu el ili falis inkan makulon kaj la knabino diris al amikino, montrante la leteron:

— Malfeliĉa Dominiko!; rigardu larmon falintan el liaj okuloj dum li skribis al mi!

Veturis al foiro maljuna virino, antaŭ kondukante tri azenetojn.

Kelkaj junuloj salutis ŝin tiamaniere:

— Bonan tagon, patrino de l'azenoj!

— Adiaŭ, miaj filoj!, ŝi respondis tute ameme.

Grandegnazsinjoro interparolas kun amiko, dirante:

— Estas tre longa, tio pri kio mi volas paroli al vi.

— Ĉu la afero estas via nazo?

Idioto, kiu edziĝis kun malbela virino, sed diskreta, diris al tiu ĉi lasta tuj post ilia edziĝo kredante flati ŝin:

— Malgraŭ ke vi estas malbela, mi amos vin kvazaŭ vi estus belega.

— Kaj mi, kvankam vi estas besto, korespondos, estimante vin kvazaŭ vi estus persono.

Sinjorino havis tiel trobableman kuirstinon, ke, iam, kiam tiu ĉi demandis la sinjorinon pri kiamaniere ŝi devas spici kaj kuiri angilon, ŝi atingis kiel respondon :

— Silente.

— Sinjoro Telesforo, ĉu vi ne akceptas ke la virino, kiu estas la lasta dia kreitaĵo, estas ankaŭ pro tio la plej perfekta ?

— Jes, mia kara; sed Dio estas granda Arhitek-
turisto, ĉar fininte la konstruaĵon li enmetis vent-
montrilon en ĝian pinton.

— Dum regala festeno de Moŝta Grafino A., oni ektoastis por libereco kaj progresado.

Dezirante imiti la tostantojn, diris riĉa ban-
kiero :

— Kvankam aristokrato kaj milionulo, mi ankaŭ estas amantegema al la... 93,...

— Po cento; interrompis la Grafino.

La patro.—Ĉu vi, alifoje batis vian frateton?

La infano.— Jes, paĉjo; mi batis lin, ĉar li trinkis inkon kaj poste li ne volis manĝi pecon da sorba papero, kiun mi donis al li.

Eksameno pri Fiziko

La Profesoro.— Diafaneco estas la propreco, kiun havas la korpoj tra kiuj oni povas vidi la lumon. Nu! citu al mi ekzemplon pri diafana korpo.

— La serura truo.

Infanino eniras, kun sia patrino, en bazaron, kie ŝi lasis, antaŭ kelkaj tagoj, sian pupon por ĝin aranĝigi.

La komercisto traserĉas ĉe ĉiuj kestoj, netro-
vante ĝin.

La infanino, korprenita, sekvas, per sia vidado, la movojn de la komercisto kaj diras timeme:

—Sinjoro, mia pupo estas nomata Dolnjo!

Du kamparanoj, patro kaj filo, vizitas gravan urbon.

Ili eniras en kafejon, kies elpendaĵo diras: «Kafo kaj bilardo.»

Alvenas kelnero, kiu demandas, kion deziras ili trinki:

La filo.— Mi volas kafon sen sukero.

La patro.— Do mi, bilardon kun sukero.

Nu, kion scias la kuracistoj ?, kion scias ili ?; nenion; diris lignisto.

3 Atentu. Iam, najbaro mia falis kaj rompiĝis al li kruro. Mi aranĝis ĝin kaj antaŭ ol unu horo, li marŝis perfektege.

— Ĉu antaŭ ol unu horo? kaj la kruro, vere, estis rompita ?

— En du pecoj.

— Kaj kiel vi aranĝis tian aferon ?

— Per gluo kaj najloj, ĉar la kruro estis ligna.

Junulo.—Maskitino: senmaskigu vin. Ŝajnas al mi ke vi estas ĉarmega. Ĉu vi eble havas mian aĝon?

—Jes (kaj tiun de l'aliaj) ŝi aldonis mallaŭtavoĉe.

Maljuna ludvetistino al sia najbaro:

—Vetu cent frankojn por mi.

—Sed, sinjorino, mi ne konas vin...

—Tial mi petas al vi tiun ĉi favoron, ĉar se vi konus min, certe, vi ne pruntedonus al mi tiun kvanton da mono.

—Fraŭlino, ĉu vi volas ke mi konduku vin glitumante?

—Bone, sed kondiĉe ke vi ne parolu.

—Kial?

—Ĉar vi havas tiel pezan konversacion, ke ĝi povus rompi la glacian.

La duan tagon, kiam ŝi estis en hejmo, servistino aperas antaŭ la mastrino kun fingro envolvita per poŝtuko, demandante per kortuŝata voĉo:

—Ĉu la forkoj kaj kuleroj estas el arĝento, sinjorino?

—Kial vi demandas tion, knabino?

—Ĉar mi ĵus pikis min per forko kaj se ĝi estus fera, mi tuj irus sanigi min ĉe la kuracisto.

—Ne timu pro tio, respondis la mastrino, ridetante pro la servistina naiveco; ĉiuj miaj forkoj kaj kuleroj estas el arĝento.

—Ho, ekkriis la servistino per kontentiĝa ekĝemo; despli bone.

Kaj efektive, la sekvantan tagon malaperis ŝi, la forkoj, kaj la kuleroj.

La juĝisto.—Kulpigitino, ĉu vi aŭdas tion, kion diras sinjorino Mario? Ŝi diras, ke vi ŝtelis ŝian porkon.

—Estas vere, sinjoro, mi ĝin forprenis, mortigis kaj manĝis.

—Kaj vi ne havas koncienciproĉon? Kiam alvenos la Finajuĝo kaj vi retrovos, rekte al via vizaĝo, sinjorinon Marion kaj ŝian porkon, kion vi diros?

—Sed ĉu via Moŝto kredas que la porko, ankaŭ, estos tie?

—Sen ia ajn dubo.

—Do, bone; tiam, mi diros: «Sinjorino Mario, bonvolu pardoni min, kaj jen via porko; reprenu ĝin.»

Vilaĝano vizitas sian mastron, kiu loĝas en urbo kaj en mirinda domo, meblita kun lukso kaj eleganteco.

Al malfeliĉa viro alkuras deziroj kraĉi kaj tion ĉi li faras sur la molan tapiŝon.

La servistino, vidante tion, rapidas loki kraĉujon dekstren de li. Sed la vilaĝano, alfoje, sin sentante kraĉema, ripetas la agon. La servistino ŝanĝas la lokon de la kraĉujo, ĝin lokante tuj maldekstren de la vizitanto. Fine, tiu ĉi ekkrias: «Knabino, bonvolu malaperigi tiun ĉi objekton,

ĉar povos okazi, ke mi, senvole, kraĉu sur ĝin.»

— Kiel vi disdonus ĝuste tri ovojn inter kvar personoj ?

— Farante ovaĵon per ili kaj donante unu pecon de ĝi, al ĉiu.

Knabinon ses aŭ sepjara doloras la dentoj, kaj tial, ŝi ploras.

Ŝia patrino diras al ŝi:

— Sed, infanino, ĉu vi ne hontiĝas plori antaŭ tiom da personoj.

— Ho, se mi estus kiel vi, tute certe mi hontiĝus.

— Kiel mi? Kaj kial?

— Ĉar kiam vin doloras la dentoj, vi eltiras ilin!

Ĝenerala ridegado de la ĉeestantaro.

Domo estis brulinta, kaj individuo, prezentis petskribaĵon, postulante bonfaran krucon, pro tio ke li estas savinte viron.

— Vi devas tion pruvi, oni diris al li. Kie estas tiu ĉi viro?

— Li estas tie ĉi.

— Kiu li estas.

— Mi mem, ĉar tuj kiam mi vidis la domon, kie mi loĝis, ekbrulantan, mi ekforkuris, ĝin forlasante kaj, tiel, savinte al mi mem la vivon.

Kuracisto estas ekzameninta malsanulon, kiu nur havas unu heredontan nepon.

Tiu ĉi, ŝajne korpremita, demandas pri la sano de sia onklo.

La kuracisto, divenante la sentojn de la junulo, respondas ruze:

— Karega; estas pli da esperoj por li, ol por vi!

Iam, amiko tre malriĉa, pruntepetis 100 spesmilojn, al unu el siaj amikoj.

Tiu ĉi konsentas kaj ilin pruntedonas.

Post unu semajno, la malriĉa amiko, ripetas la peton de sama kvanto da mono.

La pruntedonisto, kompreneble, rifuzas la novan pruntedonon.

Trakuris la tempo kaj iun tagon, interdisputante la amikoj, la kreditoro diris al la ŝuldanto:

— Pli bone estos ke vi pagu al mi la 100 spesmilojn, kiujn vi ŝuldas al mi.

— Mi ŝuldas al vi nenion, respondis la malriĉulo.

— Pardonu, mi petas!:

— Unu fojon, mi petis de vi 100 spesmilojn kaj vi prunedonis ilin al mi. Aliajn fojon mi petis de vi 100 spesmilojn kaj vi neis ilin al mi. Nu! Do, ni estas kvitaj!

Malŝparema kaj riĉa fraŭlo diras per konvinkata tono:

— Dek spesmiloj ĉiutage ne sufiĉas al mi por miaj elspezoj.

— Tamen mi nur gajnas po kvin spesmiloj ĉiujn tagojn kaj mi ŝparas iom; respondis amiko.

— Nu! kia malsameco. Vi estas edziĝinta kaj patro de kelkaj gefiloj.

— Mi estas ĝojega: Fine, mi atingis aparteni al la Societo protektanta de la bestoj.

— Sed, ĉu vi apartenas al ĝi, kiel protektanto, aŭ kiel protektato?

— Kelnero, kia malmola viando! Cu ĝi esta-
ĉevala?

— Ne, sinjoro, bicikleta.

La Juĝisto:— Ne neu tion, ĉar mi povas prezenti al vi pli ol unu atestanton, kiu vidis vin ŝtelantan.

— Sed mi povas prezenti al vi pli ol mil, kiuj tion ne vidis.

Edzo sin prezentas antaŭ sian edzinon ebria, zigzagante kaj preskaŭ ne povante stari nek marŝi.

La edzino:— Daŭrante tiel, kien vi alvenos?

La edzo:— Daŭrante tiel, certe mi ne povos foriri el tie ĉi.

Ĉe tajlora bazono estas, en la montra fenestro, pantalono kun skribaĵo, kiu sciigas ke la pantalono kostas cent spesmilojn.

Sinjoro ĝin rigardadas scivole, pensante ke ĝi havas neniun apartaĵon kaj ke ĝi estas malpli bona ol aliaj kiuj estas en la sama montra fenestro, afiŝataj per malalta prezo.

— Aŭskultu, li demandas la mastron de la bu-

tiko, ĉu vi povus diri al mi, kion eksterordinaran havas tiu pantalono?

— Kion eksterordinaran ĝi havas? Nu! la prezon!

— Surprize mi rimarkas, ke viaj hieraŭaj nigraj haroj estas hodiaŭ grizaj. Al kio tio ĉi obeas?

— Al terura ĉagreno, kiun hieraŭ nokte mi suferis.

La sekvantan tagon:

— Nu! ĉu viaj haroj renigriĝis? Kiel?

— Pro nokta gajeco, kiu al mi hieraŭ okazis.

La kuracisto ekzameninte malsanulon,

— Se vi volas resaniĝi, via unua devo estas fumi nek unu cigaredon plu.

— Facile kaj senĝene, mi povos komplezi vin, ĉar mi, dum mia tuta vivado, neniam fumis.

Antaŭ juĝistaro.

La Prezidanto:— Oni kulpigas vin, ĉar vi bastonis vian najbaron.

— Vi estas prava, S-ro. Prezidanto; jes; vi estas pravega.

— Ĉu vi konfesas vian kulpon?

— Jes; sed rimarku, Moŝta Sinjoro, ke mi estis tiam ebria kaj mi kredis bastoni mian edzinon anstataŭ la najbaron.

Du leteroj.

«Amiko Johano: Mi dankos treege vin pro la

sendo de unu spesmilo, kiun mi multe bezonas.
Ĉiam fervore via, Teofilo.»

«Estimata amiko Teofilo: Mi legis vian leteron al miaj spesmiloj kaj ili profesas al mi la saman amon kiel mi al ili. Mi ne trovis iun ajn el ili, kiu deziras veni al vi, ĉar ili diras ke neniam plu revidus min. Via sindonema. Nikanoro.»

En ronda manĝotablo de hotelo, petolema vojaĝisto, kiu sidas apud pastro, prenas ĉiujn olivojn, kiujn entenas telereto.

La pastro atentigas lin pri tio, dirante al li:

— Sinjoro, mi ankaŭ ŝatas la olivojn.

— Sed, certe, ili ne plaĉas al vi tiom, kiom al mi, respondis la alia trankvile.

En restoracio, katalano vespermanĝas kontraŭ andaluziano ovaĵon, same kiel lia kunulo, kiu manĝas alian.

La andaluziano, subite grimacas kaj ĝin lasas. Li rimarkis, ke en ĝi estis du muŝoj.

La katalano trovas en tiu, kiun li manĝas, ankaŭ unu muŝon kaj li venigas la mastron.

— Aŭskultu, mi petas, li diras: ĉu tiu ĉi sinjoro pagas, okaze, pli ol mi por ovaĵo?

— Ne, sinjoro, respondas la mastro. Sed kial vi demandas tion ĉi?

— Kompreneble, ekkrias la katalano, tial ke al tiu ĉi sinjoro oni alservas du muŝojn kaj al mi nur unu.

Kunulo al alia

— Ĉu vi volas veni kun mi kartludi?

— Mi ne ludas; neniam estis karto en mia mano.

— Kiu komprenas tion? Ĉu vi ne ludas? Vi, kiel mi, estas mallaborema, malŝparema, drinkema, k. t. p., kaj tamen ĉu vi ne ludas?

— Kion fari? En tiu ĉi mondo, neniu povas esti perfekta!

Tra strato, viro iras renkonti alian kaj, ĝentile petas lin:

— Ĉu vi povos, sinjoro, montri al mi modestan hotelon, kie mi povus tagmanĝi por unu spesmilo?

— Jes; volontege. Daŭru tra ĉi tiu strato mem, kaj je ĝia fino vi vidos la «Esperanton-Restoracion», kie vi trovos, kion vi deziras.

— Milionon da dankoj al vi; sed nun ĉu vi povas montri al mi, kie mi trovos unu spesmilon?

Malsaĝa sinjoro eniras ĉe tajloron kaj mendas al li du redingotojn.

La tajloro prenas lian mezuron kaj la sinjoro restas atendante.

— En kio ankoraŭ, mi povas komplezi vin? demandas la tajloro.

— Mi diros al vi; mi venis por ke vi faru al mi du redingotojn kaj vi nur notis mezuron por unu.

Drinkulo diris:

— Mi ne scias kial oni riproĉas min; mi nur trinkas vinon du fojojn ĉiutage; kiam mi manĝas haringojn kaj kiam mi ilin ne manĝas.

Sinjoro surprizas kaj kaptas malgrandan knabon en la momento mem, kiam tiu ĉi eltiras horloĝon el lia poŝo.

Vidinte lin tiel junan kaj jam *laborantan* en tia metio, la sinjoro sentis por li kompaton kaj diris :

— Ĉu vi ne vidas, ke tio ĉi estas ŝteli? Aŭdu; kion vi dirus se mi prenus al vi vian ĉapon?

— Nu! mi dirus al mia patro, ke li aĉetu al mi alian, respondis la ŝtelistemuleto.

Kaporalo diras instruante soldatojn :

— Aŭdu kaj atentu bone: duono da turno dekstren, estas tute same, kiel duono da turno maldekstren; nur tio ĉi estas tute male al tio.

Avarulo pruntedonas sian monon laŭ 9 po cento.

— Ĉu vi ne timas la punon de Dio pro via tre alta procento?

— Ho, ne, ĉar Dio, loĝante super ni, vidas de tie 6 anstataŭ 9.

Ĉe perukisto, sidiĝas junulo sur seĝo kaj petas, ke oni tonda al li la harojn.

— Aŭskultu; kiel vi volas ilin?, demandas la tondisto.

Kaj la junulo respondas :

— Lasu ilin iomete pli longaj.

Tajloro, tre komplimentema, diris al sia kliento :

— Kion fari? Mi, al distingindaj klientoj, neniam demandas monon. Mi ne povus.

— Kaj se ili ne pagas...?

— Tiam, kiam ili jam ne estas distingindaj, ilin mi vangofrapas ĝis enspezi la ŝuldon.

Tre mallerta rajdanto ŝanceliĝas sur ĉevalo.

Tramveturila kondukanto, kiu tion rimarkas, diras per laŭta voĉo, mokante lin :

— Ĉu vi volas akcepti mian konsilon? Do, malsupreniru de la imperialo kaj eniru tuj ĉe la internajon; vi estos pli sendanĝere.

Nokte, jam tre malfrue kaj en strato senhoma, viro suspektega kaj malbonvizaĝa, malfermante longan vundtranĉilon, haltigas sinjoron dirante al li, per raŭka voĉo :

— Ĉu vi povus diri al mi, kioma horo estas nun?

La sinjoro, kiu de tre malproksime jam vidis lin, eltiras revolveron el sia poŝo kaj respondas celante lin per ĝi :

— Se vi nur antaŭeniras unu paŝon plu, tuj sonoros la sesa.

Cigano, sin konfesante, rimarkas arĝentan skatoleton, apud la pastro, en la konfesprenejo, kiun rapide, lerte kaj kaŝeme li ŝtelas, enpoŝante ĝin.

-- Patro, mi ankaŭ devas konfesi, ke mi estas ŝtelinte malgrandan skatolon.

— Unue, vi devas ĝin redoni al ĝia mastro.

— Ĉu vi ĝin volas, pastro?

- Tute ne, diru tion al ĝia mastro.
— Tiel mi faris, sed li ĝin ne volas akcepti.
— Do, tiel, restu trankvila; Dio pardonos vin.

Eniras servistino en balaĉon. Ŝi malaperigas sian koltukon kaj montras duonon da nuda dorso kaj saman kvanton da nuda brusto.

Policano alproksimigas ŝin dirante:

— Aŭskultu, knabino, ĉu vi ne povus esti iomete pli konvena?

— Nu! Kiel mi estas?

— Mankas al vi iom da ŝtofo.

— Pardonu, sinjoro, ne estas tio; estas al la korsaĵo de mia mastrino, al kiu malmankas mi.

— Mi ne scias kiel vi agas por skribi tiel rapide, diris al gazetisto, alia amiko sia.

— Estas tre simple; kurigante la manon.

— Kaj kial vi skribas tiel rapide?

— Kial? Por ne havi la tempon trompi min.

— Sinjorino; mi estas tre superstiĉa!

— Kaj mi ankaŭ, sinjoro; jen ekzemplo. Mi ne vidas pli pereigan aferon, ol esti sidantaj dektri personoj ĉirkaŭ manĝotablo... kiam nur estas manĝaĵoj por dekdu!

Naiveco.

— Vere la Suno estas tute neĝustatempa. Lumigi dum la tago, kiam ni ĝin ne bezonas...!

— Ĵ...! (Ŝultrafalado de l'aŭskultanto.)

Ĉe juĝejo oni devis juĝi pri tre malhonesta afero. Rimarkinte la juĝistestro multajn virinojn en la ĉeestantaro, diris:

— Mi petas la honestajn virinojn bonvolu forlasi la salonon.

Neniu moviĝis. La juĝistestro, tiam aldonis:

— Jam foriginte la honestajn virinojn, mi ordonas eliri ĉiujn ceterajn.

Servistino eljetas saŭcon sur la tablotukon.

— Besto! ekkrias la dommaestro; eĉ ankaŭ mi scias fari tion ĉi.

— Nu, kia ŝerco! ĉar vi jam vidis fari tion al mi.

Fama kantistino postulis grandan monsumon por kanti antaŭ imperiestro.

— Neniu el miaj generaloj, diris la imperiestro, gajnas tiom da mono.

— Bone, tiel, devigu, via Imperiestra Moŝto, kanti la generalojn.

Promenas du naivaj malgrandaj knabinoj:

— Ĉu vi vidas tiujn du bovinojn, unu blankan kaj nigran la alian?

— Ho, jes!

— Do, oni eltiras la lakton, el la blanka.

— Kaj el la nigra?

— ...La kafon!

Estis, en parolkunveno, fraŭlino tiel bela, kiel

babilema; kaj demandinte, unu el la ĉeestantoj alian, kion pri ŝi li admiras, respondis, tiu ĉi:

— Tio, pri kio mi pli miras, estas ke, tiom da lango havu sufiĉan lokon en tiu malgranda buŝeto.

— La unuan fojon, kiam vi reforlasos min, Doroceino, mi memmortigos min kontraŭ viaj piedoj.

— Kaj la duan?

Dio ilin kreas, kaj ili kuniĝas.

— Kian bonan negocon mi efektivigis. Mi pruntedonis cent spesmitojn dum unu jaro laŭ kvindek po cento, enspezante la procenton unue; tial mi nur devis doni kvindek spesmitojn.

— Kia malsaĝa vi estas; se vi estus pruntedoninte dum du jaroj, vi estus atinginta doni nek unu spesdekmon.

Amiko atentigis alian, pri lia malbonodora elspirajo.

— Preskaŭ mi ne rimarkas ĝin, diris tiu ĉi lasta.

— Kompreneble, respondis la unua, sed ne ĉiuj povas diri same kiel vi.

Post la edziĝo.

La edzo:— Nun, kiam ni jam estas edziĝintaj, mi devas konfesi al vi, ke se mi estus ricevinta iun gravan favoron vian, mi ne estus edziĝinte kun vi.

La edzino:— Tial mi agis tiel; ĉar mi jam estis puninstruita de aliaj.

— Ĉu vi scias kion, unue, faras virino, kiam ŝi deziras estis atingita de viro?

— Jes; forkuri.

— Mi foriras tiun ĉi vesperon al Londono; ĉu vi volas ion, Marinjo?

— Jes, kunportu al mi belan akvoŝirmilon.

— Kiel vi volas ĝin?

— Senpage.

Voltaire. — Ho, fraŭlino, mi estas okdek kvar jara kaj mi faris okdek kvar sensencaĵojn!

Sofio Arnoult. — Kaj kio estas tio ĉi? Mi nur estas kvardek jara, kaj, tamen, mi jam faris pli ol mil.

— Ĉu estas vere, Sinjorino, ke vi diris, ke mi tute ne havas talenton?

— Mi neas, ĉar estas la unua fojo kiam mi aŭdas paroli pri ĝi.

— Kiom da ammanieroj estas?

— Nur unu, sed kun diversaj kopioj.

Bela tre lerta, vilaĝanino, kiu revenis al sia vilaĝo, malantaŭ sia ŝarĝita azeno, renkontis enamemitan junulon, kiu demandis ŝin:

— Ĉu vi konas la filinon de la vilaĝestro?

— Jes.

— Do bonvolu kunporti al ŝi tiun ĉi kison.

Dirante tion, la junulo intencis paroli kaj agi samtempe.

Sed la vilaĝanino forkuris kaj diris :

— Donu aŭ faru ĝin al mia azeno, kiu irante antaŭ mi, alvenos pli frue en la vilaĝon.

— Panjo; morgaŭ estos la avina nomfesto. Kiel ŝajnas al vi, ke mi devas ŝin gratuli ?

— Dirante, ke vi deziras ŝian feliĉan *alvenon* ĝis la maljuneco.

— Sed, ĉu vi ne kredas preferebla ke mi deziru ŝian feliĉan *revenon* al la juneco ?

Ŝparema sinjorino, kiu vojaĝas kune kun sia servistino, eniras en gastejon.

— Aranĝu al mi unu ovon kuiritan kaj profitu la bolitan akvon por fari supon por mia servistino.

— Sed rimarku, sinjorino, ke tio ne estos nutra.

ta — Bone; aldonu alian ovon, kaj kuiru du, anstataŭ unu.

Inter geviroj :

— Mi juras, neniam plu enmeti miajn piedojn ĉe vin, malsprita virinaĉo ?

— Bonege; mi tion ĉi komprenas, ĉar estas mia domo tro malgranda por viaj piedoj.

— Fraŭlino, mi rimarkas beston sur via jupo.

— Kompreneble, ĉar vi piedpremas ĝin.

Inter du infaninoj

— Kiel bela estas la ĉielo !

— Ho, jes, belega, kvankam ĝin ni vidas nur returnitan.

Ĉe muzika festo dum ludado de sinfonio nomata *La karavano* :

— Kiel bone esprimita estas la laceco.

— Jes; de l' aŭdantaro.

En banejo

Unu sinjorino al alia, kiu kunportas infaninon:
— La bano min ĝenas, pro tio ke la haroj tro malfruas resekiĝi.

La infanino:

— Tial, mia patrino ĉiam ilin forlasas hejme.

Kristino el Svedujo diris :

— Mi amas la virojn, ne precipe nek precize pro tio ke ili estas viroj, sed tial, ke ili ne estas virinoj.

Sinjorino sin prezentas kiel atestantino antaŭ juĝejo:

La Juĝisto. — Kiom aĝa vi estas ?

— Mi havas tridek jarojn.

— Ĉu tridek ? Antaŭ kvar jaroj vi respondis same.

— Kompreneble, Moŝta sinjoro, ĉar mi ne estas unu el tiuj, kiuj hodiaŭ diras unu kaj morgaŭ alian aferon.

Ĵaluza edzo ĉeestas, kun sia edzino, masko-
balon.

Por provi ŝin, li lasas ŝin akompanatan de ŝia
kuzo, dum li alkuras sin maskvestigi, tuj reve-
nante kaj dirante al sia edzino, per ŝajniga voĉo,
kelkajn amindumajn frazojn, kiuj meritas al li du
fortegajn edzinvangfrapojn.

Tute ĝoja pro tia fideleca pruvo, la edzo, ride-
tante, malaperigas sian maskon samtempe ke,
malagrablvizage, ŝia edzino ekkrias;

— Kia amuza ŝerco! ĉu vi kredis, malspritulo,
ke mi ne antaŭrekonis vin?

—
Geedzoj havas du filinojn edzinigitajn; unu estas
grasa; malgrasa la alia.

La edzo.—Sed, mia edzino, rimarku ke de kiam
niaj filinoj edzinigis, ankoraŭ vi ne skribis al ili.

— Tuj mi komplezos vin, respondis la edzino;
kaj skribis al unu: «grasiĝu»; kaj al alia, «mal-
grasiĝu.»

— Mia Dio, kiaj mallongaj leteroj!..

— Sufiĉan laboron havos niaj filinoj se ili klo-
podas plenumi mian mendon.